1. Interkultura lernado kaj situacio en Eŭropo (de Alexandra Raykova•)

- Kio estas Eŭropo kaj kien ĝi iras
- Eŭropo: koncepto de diverseco

Eŭropo ĉiam ludis gravan rolon en tutmonda ekonomio, politiko kaj historio. Hodiaŭa Eŭropo estas ne nur geografia aŭ politika nocio, sed ankaŭ aro de konceptoj – ne nur tiuj de diversaj eŭropaj institucioj aŭ de loĝantaro de Eŭropo, sed ankaŭ tiuj de la resto de la mondo.

Tiuj konceptoj havas multajn malsamajn interpretojn, la ĉefa ideo de kiuj estas tamen la sama: Eŭropo estas nia komuna domo. Fakte, Eŭropo ĉiam estis la motoro ne nur de evoluo kaj civilizigo, sed ankaŭ de revolucioj kaj eĉ de tutmondaj militoj.

Hodiaŭ, la tiel nomata "malnova kontinento" havas tre novan vizaĝon. Ĝi estas la vizaĝo de kreskanta kaj ŝanĝiĝanta diverseco. Diverseco, kies radikoj troviĝas en historio. La unua parto de ĝi estas kolonialismo. De mezepoko ĝis preskaŭ modernaj tagoj multaj eŭropaj landoj (Britio, Portugalio, Hispanio, Francio kaj aliaj) havis koloniojn en diversaj kontinentoj. En la fino de 50-aj kaj dum 60-aj jaroj de la 20a jarcento migrantaj laboristoj de tiuj kolonioj estis invitataj al eŭropaj landoj. Nuntempe multaj homoj vojaĝas inter kontinentoj, parte kiel turistoj, sed plej parte kontraŭvole, kiel elmigrantoj devigitaj pro diversaj neeviteblaj cirkonstancoj forlasi la propran landon.

Hodiaŭ estas tute kutima, ke nordafrikano estas najbaro de franco, indiano – de brito, ktp. Se ni aldonas al tio ĉinon, rumanon, nigrulon kaj elmigranton de la Balkana regiono - tiam la reala bildo preskaŭ iĝos kompleta. Tiu ĉi diverseco dum multaj jarcentoj kreis firmajn ligojn inter Eŭropo kaj aliaj kontinentoj. Hodiaŭa Eŭropo ne imageblas sen tiu riĉeco venanta de bunteco de homoj kaj kulturoj troveblaj en ĝi.

Jam pli ol 10 jarojn antaŭe finiĝis la Malvarma Milito. Ne plu ekzistas la fera kurteno inter Orienta kaj Okcidenta Eŭropo (almenaŭ ne en ĝia origina formo). Sed homoj daŭre apenaŭ ion ajn scias unu pri la alia: pri najbaro en la apuda domo aŭ apartamento, pri kolego en laborejo aŭ pri persono ĉe la apuda tablo en la kafejo. Por havi la komunan estonton ni bezonas kaj devas lerni multon pri aliaj, kontraŭbatali niajn antaŭjuĝojn kaj falsajn imagojn.

La normala reago de ĉiu unuopa homo estas defendo de propra kulturo kaj propraj grupprincipoj. Jen kial estas tiom facile "glui etikedojn" sur ĉiujn aliajn. Sed la nuntempa realeco klare montras, ke sendepende de tio, ĉu ni akceptas diferencojn/kulturajn malsimilaĵojn de homoj ĉirkaŭ ni aŭ ne, ni devas trovi manieron kunvivi en la sama socio.

Alikaze ni devas alfronti la dilemon:

Ĉu esti aŭ ne esti.

Historio de Eŭropo klare montras, ke neniam estis, nek daŭre estas facila trovi manieron akcepti tiujn malsimilaĵojn kaj repaciĝi kun ili. Interesoj, interalie ankaŭ politikaj, disdividas homojn surbaze de ilia etna, religia aŭ alispeca fono celante provoki konfliktojn kaj redistribui socian potencon aŭ geografiajn terenojn.

Ĝuste tiel estis en la kazoj de la Unua kaj la Dua Mondmilitoj, t. n. Malvarma Milito, konstantaj konfliktoj en Eŭropo (ekzmple en Irlando, Hispanio kaj Cipro) kaj lastatempaj konfliktoj en Balkanio kaj Kaŭkazo.

En 1947 dum unu el politikaj kunvenoj, britia milittempa gvidanto Winston Churchill demandis: “Kio estas nun Eŭropo”, kaj respondis mem: “Ruinoj, buĉejo, la bredejo de epidemioj kaj malamo”. Lia malagrabla vizio ne estis troigita. Al la fino de la Dua Mondmilito Eŭropo estis plene detruita, sed kion ni lernis de historio? Kial la vizio de Churchill daŭre estas aktuala por kelkaj partoj de la nuna Eŭropo?

Pluraj milionoj da homoj mortis en la militoj. Multaj ĝis nun suferas en kondiĉoj similaj al tiuj de post la Dua Mondmilito. Aliaj timas reveni al siaj loĝlokoj pro la risko esti murdotaj tie. Ni alfrontas tutmondan problemon: homoj ne lernas de propraj tragikaj spertoj. Homoj uzas kontraŭ aliaj – eĉ tiuj, kiuj neniel estis enmiksitaj en koncernajn konfliktojn, - metodojn, de kiuj ili mem kruele suferis.

Alfrontante tiajn situaciojn civitanoj de Eŭropo kredas kaj esperas ke internaciaj institucioj povas rapide reagi kaj trovi solvojn por ĉiuj problemoj. Malgraŭ tiu espero civitanoj de Eŭropo plej parte eĉ ne povas distingi inter Konsilio de Eŭropo kaj Eŭropa Unio, kaj inter tiuj, kiuj povas, nur tre malmultaj scias ion pri historio, politiko kaj principoj de tiuj institucioj.

Inter la organizoj engaĝitaj en konstruon de paca Eŭropo necesas mencii Konsilion de Eŭropo, la Organizon por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo kaj la Eŭropan Union. Estas grava koni kiel la historion kaj principojn de tiuj institucioj, tiel ankaŭ iliajn eblecojn kaj limigojn. Tio helpas plej bone uzi la sperton kaj ilojn, kiujn tiuj institucioj ellaboris por subteno de diversaj organizoj kaj institucioj je nacia kaj loka nivelo.

Homoj ofte ne konscias pri tio, ke ili mem havas potencon solvi proprajn problemojn. Ja ege ofte per konkretaj agoj oni povas efike influi siajn sociojn. Tiurilate neregistaraj organizoj (NRO-j) kaj junuloj havas apartan rolon.

1.1.2. Kelkaj vortoj pri la historio kaj la principoj de la Eŭropaj institucioj.

La 5an de majo, 1949 en St. James Palaco en Londono reprezentantoj de 10 landoj (Belgio, Francio, Luksemburgio, Nederlando, Britio, Irlando, Italio, Danio, Norvegio

kaj Svedio) subskribis la interkonsenton, kiu formis la Statuton de la Konsilio de Eŭropo.

Hodiaŭ (en junio 2000) la Konsilio de Eŭropo havas 41 membroŝtatojn. Ĝiaj celoj estas protekto de homaj rajtoj, ĉiuflanka demokratio kaj supereco de leĝoj, antaŭenigo de konscio pri Eŭropa kultura identeco kaj diverseco kaj subteno al ĝia evoluo, serĉado de solvoj por problemoj alfrontantaj la Eŭropan socion kaj plifirmigo de demokratia stabileco en Eŭropo sur politika, jura kaj konstitucia bazo.

La fakto, ke tiu ĉi Eŭropa institucio funkcias tra la tuta kontinento, ankoraŭfoje montras kiom vasta kaj diversspeca estas Eŭropo kaj kiom grandan politikan rolon havas tiu ĉi institucio en la pli granda moderna Eŭropo.

En 1950 Robert Schuman, Ministro pri Eksteraj Rilatoj de Francio, proponis aplikon de programo de Jean Monnet pri kunigo de karbo- kaj ŝtalproduktado en Eŭropo. “Ne plu estas tempo por vanaj vortoj”, alvokis Schuman en la plano. “Por paco kaj havigo de realaj ŝancoj, unue necesas ke ni ekhavu Eŭropon.” La sekvan jaron al la Eŭropa Komunumo por Karbo kaj Ŝtalo (EKKŜ) aliĝis 6 landoj: Francio, Germanio, Italio, Belgio, Nederlando kaj Luksemburgio. Britio estis supozata gvidi la unuiĝon, sed rifuzis pro perdo de suvereneco, al kiu gvidus aliĝo al EKKŜ.En 1955 reprezentantoj de 6 ŝtatoj-membroj de ECSC kunvenis en Sicilio por diskuti pli vastan ekonomikan unuiĝon. Rezulte en 1957 per subskribo de konvencio de Romo estis establita Eŭropa Ekonomia Komunumo, pli vaste konata kiel Komuna Merkato.

Laŭ la ideo de fondintoj – Monnet, Spaak, Schuman kaj aliaj – la **Eŭropa Unio** ankaŭ donis esperon al ekzisto de longdaŭra politika unuiĝio.

Hodiaŭ (en junio 2000) EU havas 15 membroŝtatojn, 5 pliaj negocas kaj ankoraŭ 6 estas invititaj negoci pri membriĝo en ĝi.

Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo (OSKE) estas tuteŭropa organizo pri sekureco, kies 55 ŝtatoj-partoprenantoj kovras geografie vastan spacon de Vankuvero ĝis Vladivostoko.

Kiel regiona interkonsento laŭ la Ĉapitro VIII de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, OSKE estis establita kiel ĉefa ilo en la koncerna regiono por frua averto, prevento de konfliktoj, traktado de krizoj kaj postkonflikta rerajtigo en Eŭropo.

OSKE estis fondita en 1975 sub la nomo “Konferenco por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo” (KSKE) por servi kiel multflanka forumo por dialogo kaj traktado inter Oriento kaj Okcidento. La Pariza Pintrenkontiĝo en 1990 donis al KSKE novan labordirekton. En la Ĉarto de Parizo por nova Eŭropo KSKE estis alvokita kontribui al traktado de historia ŝanĝo en Eŭropo kaj reagi al novaj defioj de Post-Malvarmmilita periodo.

La Pintrenkontiĝo en Budapeŝto en 1994 agnoskis ke KSKE ne plu estis simple

konferenco kaj ŝanĝis ĝian nomon al OSKE. Nuntempe OSKE gvidas laboron pri stimuligo de sekureco per kunlaboro en Eŭropo. Por atingi tiun celon ĝi kunlaboras kun internaciaj kaj regionaj organizoj kaj tenas kontaktojn kun multnombraj neŝtataj organizoj.

- **La defioj por Eŭropo**

Nuntempe Eŭropo alfrontas defion de ekonomika, politika kaj geografia restrukturigo. Sed la plej granda defio tamen restas gardo de paco kaj antaŭenigo de stabileco en Eŭropo. Laboro pri tio, ellaboro de mallong- kaj longdaŭraj strategioj por tiu celo, serĉado de optimuma maniero de kunlaborigo de diversaj institucioj por realigo de iliaj politikoj cele al establo de paco en Eŭropo, estas defio ankaŭ por ekzistantaj politikaj sistemoj.

Finfine, Eŭropo devas difini sian novan rolon en la mondo: tiun de efika kaj respondeca aganto en tutmonda politiko kaj ekonomio, sentema al tutmonda amplekso de defioj, pledanta por principoj al profito de ĉiuj loĝantoj de la mondo.

Efektive pluraj institucioj enkondukis diversspecajn metodojn kaj ilojn por atingo de simialj celoj: Konvencion pri Homaj Rajtoj, diversspecajn kadrajn konvenciojn, integrigajn programojn, rimedojn por establo de Komuna Merkato ktp.

Laboro de eŭropaj institucioj estas bazita sur principoj kiuj ludas gravan rolon en la konstruo de paca Eŭropo, kiel ezkemple likvido la kontraŭstaro inter Oriento kaj Okcidento, antaŭenigo de engaĝiĝo de minoritataj grupoj, kuraĝigo de formiĝon de interkultura socio.

Ĉiuj homoj devas havi eblecon partopreni en konstruo de Eŭropo plengrade kaj en egalaj kondiĉoj. Sekve, ne nur je la nivelo de tuteŭropa politiko, sed ankaŭ je loka kaj nacia niveloj estas grave lerni kunvivi unu kun la alia. Tiuj estas la principoj de interkultura lernado, sed tiuj samtempe estas ankaŭ la principoj de eŭropaj institucioj, la bazo por la eŭropa kunlaboro kaj integriĝo. Kiel fari el ili principojn de ĉiuj civitanoj de Eŭropo?

1.2. Novaj starpunktoj

En tiu defia situacio kelkaj evoluoj karakterizas la modernan eŭropan realecon – tiun de kulture diversspeca Eŭropo, estanta en konstataj interrilatoj kun aliaj kontinentoj. Des pli el la perspektivo de mondo en kiu tutmondiĝo iĝas pli kaj pli grava, tiuj evoluoj ŝajnas aparte envolvi interkulturan aspekton. Ili defias novajn starpunktojn kaj rolas kiel esence gravaj iloj por plirapidigi interkulturan dialogon kiel en Eŭropo, tiel ankaŭ en aliaj mondopartoj.

Unuiĝanta Eŭropo: integriĝo de diverseco?
Post la malapero de la fera kurteno eŭropaj landoj nun estas en proceso de interproksimiĝo. La politikaj, religiaj kaj ekonomiaj malkonsentoj de la pasinteco

provokis malsamajn, ofte kontraŭajn evoluojn, aparte inter Orienta kaj Okcidenta partoj. Paroli pri malsameco de tiuj spertoj estas tre komplika tasko, ja kultura kaj politika interkompreno havas siajn limojn. Tiu tasko iĝas des pli komplika pro tio, ke necesas atente konsideri ĉiujn eblajn konsekvencojn: kulturajn, religiajn, sociajn, ekonomikajn kaj politikajn. Interproksimiĝo ene de Eŭropo povas doni ŝancon evolui dialogon inter civitanoj de diversaj landoj, instrui aliajn kaj ankaŭ lerni de ili, kaj finfine en pli ampleksa skalo – redifini la enhavon de rilatoj al aliaj mondopartoj.

Sed ĉu entute eblas la dialogo pri pasintaj kaj nunaj evoluoj (inkluzive ankaŭ la malagrablajn), strecaj situacioj en ideologia sfero kaj malsamaj spertoj? Ĉu eblas strebi al integriĝo, kiu estus bazita sur egaleco? Kiel eblas kunigi homojn por ĉiuj esprimu siajn timojn kaj esperojn, pli bone konatiĝi unu kun la alia? Kiel povas ni, civitanoj, engaĝi nin por partorpeni la dialogon kaj kontribui al konstruo de unuiĝinta Eŭropo? Ĉu la "unuiĝinta" Eŭropo daŭre restos Eŭropo de diverseco, kie tiu trajto estas alte taksata? Ĉu la "unuiĝinta" Eŭropo finfine estos malferma strukturo, kiu akceptos kulturojn de aliaj mondopartoj?

Tutmondiĝo: ĉu unuiĝo aŭ unueco?

Tutmondiĝo je ekonomia nivelo alportas ŝanĝojn en ĉiujn sferojn de vivo: persona, socia, kultura. Respondeco de ĉiu unuopa individuo samtempe ŝajnas kaj plifortiĝi, kaj malaperi. La diferenco inter riĉuloj kaj malriĉuloj iĝas pli kaj pli granda, sed de alia flanko ilia reciproka influo iĝas malpli videbla. La bursisto en Novjorko povas senkonscie decidi pri la travivo de infano en la mizerkvartalo de Kuala Lumpur, sed apenaŭ imageblas la alidirekta influo. Ne estas plej facile klarigi kial tio okazas. Mondo ŝajnas evolui en tre interrilata maniero, kune ĝuante komunajn kulturajn eventojn, kiel ekzemple la Mondĉampionado de Piedpilko. Paliĝas la signifo de tempo kaj spaco. Konstanta evoluo de komunikteknologioj interproksimigas nin, permesas pligrandigi niajn konojn, sed ne nepre pligrandigas ankaŭ nian kapablon **integrigi** ilin. Maniero en kiu ni traktas tiujn komplikajn evoluojn havas diversajn rezultojn. Ĉu la pli vasta aliro al amaskomunikiloj rezultiĝos ankaŭ en plifirmiĝo de solidareco? Ĉu la mondo konektita per Interreto antaŭenigos demokratiajn principojn kaj homajn rajtojn? Ĉu povas pli bona informiĝo ŝanĝi la evoluon de historio? Ĉu ni povos uzi akiritajn konojn kiel elirpunkton por reala interkonatiĝo kaj trovo de novaj solvoj? Ĉu la kulturaj objektoj de la proksima estonto iĝos kolao, satelita televido kaj McDonalds? Kiujn antaŭkondiĉojn bezonas la proceso de tutmondiĝo por subteni pluralismon kaj kunekziston de diversaj kulturaj modeloj? Ĉu ni havas ŝancon konstrui "tutmondan komunumon", kiu donos al ĉiu decan vivon kaj indan pozicion en ĝi? Kiu regas ekonomion kaj interreton? Ĉu ŝanĝoj en percepto de tempo kaj spaco ŝanĝas ankaŭ kulturan aspekton?

Novaj socioj: multkulturaj aŭ interkulturaj?

Nuntempe homoj de diversaj socikulturaj fonoj ofte kunvivas ene de unu sama socio. Pli da informo kaj moviĝemo je unu flanko, kaj maljustaj politikaj kaj ekonomiaj cirkonstancoj je la alia, kontribuas al kresko de migradfluo inter multaj landoj. Tamen, la enmigrado en Eŭropon estas eta kompare al enmigradon al aliaj

kontinentoj. Ju pli da limoj ni forigas, des pli forte ni protektas la restantajn (tion multaj dirus pri interalie Ŝengena interkonsento). “Neniom da pliaj eksterlandanoj” iĝas moderna slogano. Ni ekas dividi eksterlandanojn en ”bonajn” kaj “malbonajn”, kialojn por enmigri en “taŭgajn” kaj “netaŭgajn”. Pluraj el niaj socioj serĉas novajn (aŭ ne tiom novajn) manierojn trakti la modernajn faktojn, tiajn kiel mizerkvartaloj de grandaj urboj, segregacion, rasismon, apartigon. Ekestas debato pri eblaj formoj de kunvivado. Ni provas respondi al la demando ĉu homoj de diversaj kulturoj povas simple vivi unu apud la alia en la multkulturaj socioj, aŭ ĉu eblas konstruo de iusenca “interkultura socio”, en kiu eblos profunda interago kun ĝiaj ĉiuj eblaj postsekvoj? Kiel la alfronto de kulturaj diferencoj influas persone nin? Ĉu ni sukcesos akcepti la kulturan diversecon inter ni kiel la ĉiutagaĵon? Ĉu ni sukcesos lerni aprezi tiujn diversecon? Ĉu ekzistas eblecoj evoluigi diversajn alternativojn de kunvivado – en nivelo de distriktoj, urboj kaj finfine tutaj landoj? Ĉu malsamaj kulturoj povas kunekzisti surbaze de reciproka interesiĝo, akcepto kaj respekto? Kiuj procesoj devas okazi por ke ni povu atingi tiujn celojn? Kiujn malfacilaĵojn ni devos renkonti?

Identeco: naciisto aŭ mondcivitano?

Tiuj novaj socioj, pluralismaj kaj multnaciaj estigas malcertecon. Tradiciaj kulturaj ligoj malaperas; kresko de diverseco povas esti perceptita kiel minaco al tio, kion ni nomas “nia identeco”. Ĉefaj eroj kaj ligoj: nacio, teritorio, aparteno al religio, politika ideologio, profesio, familio, -rapide ŝanĝigas aŭ eĉ perdas signifon. Tradiciaj modeloj de aparteno disfalas kaj regrupiĝas por formi novajn esprimojn de kulturo. Do, ni denove iĝas “nomadoj” serĉantaj novajn referencojn, kiuj iĝas pli kaj pli individue ellaboritaj.

Aperas pli da ideologie proksimaj grupoj, ekz. sektoj, revivĝas naciismo, respondeco estas ŝovita al “fortaj gvidantoj”. Ekonomia malcerteco, kreskanta socia maljusteco kaj polarizo kontribuas al malcerteco. Tutmonda interkompreniĝo kun neklaraj konsekvencoj ofte kontraŭstaras la personan interesiĝon en aparteno al aparta, klare difinita grupo.

Do, kion ni devas difini kiel nia “identeco” en tiu ŝanĝiĝanta mondo? Kiuspecajn referencojn kaj ilojn por orientiĝi ni povas trovi? Kiel ŝanĝiĝos la interpreto de identeco? Ĉu ni sukcesos ellabori por niaj vivoj la malferman koncepton de konstanta dialogo kaj ŝanĝiĝo en interagoj kun aliaj? Ĉu eblos reakiri certecon kadre de niaj kulturaj referencoj kaj samtempe eksenti respondecon pri kaj apartenon al la tuta mondo, kiel civitanoj de Eŭropo, de la mondo?

Potenco: minoritatoj kaj majoritatoj

En la mondo de diverseco, en kiu ni ĉiuj insistas pri nia malsimileco, gravan rolon ludas la demando pri potenco. Ne estas egala, ĉu ni apartenas al pli aŭ malpli forta parto, ĉu niaj kulturaj modeloj estas tiuj de majoritato au tiuj de minoritato. Rezulte komenciĝas novaj konfliktoj au rekomenciĝas malnovaj, religia kaj etna aparteno iĝas timigaj kialoj por milito kaj violento, interlandaj same kiel interregionaj. Jam estis proklamitaj “kolizio de civilizacioj” kaj “milito inter kulturoj”. Multe da doloro

estis kaŭzita en pasinteco, homaj rajtoj estas konstante malestimataj pro tio, ke oni ne respektas diversecon sur egalrajta bazo, pro tio, ke majoritatoj ĉiam uzis sian potencon super minoritataj grupoj.

Hodiaŭ ni provas "protekti" la "rajtojn" de minoritatoj. Se tiuj rajtoj iam estos akceptitaj kiel naturaj, ĉu la rekono de kultura diverseco gvidos nin al paca kaj reciproke riĉiga kunvivado? Ĉu homoj kapablas trovi sian propran personan "mi" nur pere de renkontiĝo kun malsimilaĵoj, sed sen ke dolorigi kaj minaci unu la alian? Ĉu ni iam komprenos, ke la terglobo estas sufiĉe granda por ke tie trovu lokojn ĉiuspecaj kulturaj modeloj? Ĉu ni iam kapablos ellabori komunan difinon de homaj rajtoj? Kaj finfine – ĉu Eŭropo iam kapablos lerni de siaj historiaj kaj nuntempaj rilatoj kun aliaj kontinentoj, kaj ankaŭ de sangverŝoj kiuj okazis pro nekapablo trakti diversecon?

Ĉiuj tiuj mallongaj rimarkoj kaj demandoj estas kunligitaj en komunan kadron de interdependo kaj kreas komplikan fenomenon kies vastecon ne eblas prezenti en nur kelkaj linioj.

Politiko renkontas Kulturon, Kulturo renkontas Ekonomion kaj inverse. Ĉio tio starigas demandojn al ĉiu el ni, kaj eble ne al ĉiu demando eblas trovi respondon. Kiel povas ni kontribui al Eŭropo, al la mondo en kiu ni volas vivi?

Interkultura lernado estas unu el eblaj kontribuoj. Evidente, ke nek la prezento de supremenciitaj tendencoj, nek la starigo de demandoj estis faritaj en la neŭtrala maniero. Ili baziĝas sur la principoj kiujn defendas kaj al kiuj strebas Eŭropaj institucioj, kaj sekve transdonas politikan vizion, en tiu senco, ke vi – kiel unuopaj personoj koliziante kun aliaj, estas samtempe civitanoj, kiuj kunvivas kaj konstante interagas inter si. Pro tio ni ankaŭ havas komunajn respondecojn pri la maniero en kiu funkcias nia socio. Foresto de paco signifas militon. Ĉu la foresto de milito aŭtomate signifas pacon? Kiel ni difinas pacon? Ĉu ĝin eblas simple esprimi per la starpunkto "Ne tuŝu min, kaj tiam mi ne tuŝos vin"? Aŭ ĉu ni sopiras pri io plia? Ĉu ni havas alian imagon pri kunvivado? Se ni akceptas, ke la interdependo de hodiaŭa mondo tuŝas kaj envolvas ĉiujn el ni, ĉu ni eble devas ekserĉi novajn manierojn de kunvivado? Novajn manierojn kompreni la alian, kiel individuon, kies malsimilecon al ni necesas profunde respekti?

"Interkultura lernado" helpas iom pli bone kompreni nin mem kaj aliajn. En tiu maniero ĝi povas esti uzata kiel ilo en niaj streboj kompreni la komplikan karakteron de hodiaŭa mondo. Des pli, ĝi povas iĝi la ŝlosilo per kiu oni malfermos pordon al la nova socio. "Interkultura lernado" povas doni al ni kapablon pli efike respondi al la defioj de moderna realeco. Ni povas interpreti tion kiel kapabligon ne nur persone menaĝi la modernajn evoluojn, sed ankaŭ percepti eblajn ŝanĝojn, kiuj povas kiel pozitive, tiel ankaŭ negative influi al niaj socioj.

Niaj kapabloj pri "interkultura lernado" estas bezonataj hodiaŭ pli ol iam ajn. En tiu senco interkultura lernado estas de unu flanko proceso de individua evoluo, sed de alia ĝi gvidas al komunaj rezultoj. Ĝi invitas nin pripensi pri tio, kial ni volas okupiĝi

pri ĝi, kiajn viziojn ni havas, kion ni volas atingi per ĝi.

Interkultura lernado estas ne nur persona akiro aŭ luksaĵo por kelkaj homoj, kiuj laboras en internacia medio. Ĝi havas grandan signifon por maniero en kiu funkcias kunvivado en niaj socioj. Interkultura lernado ĝenerale kaj tiu ĉi publikaĵo aparte espereble instigos kuraĝon trovi respondojn al almenaŭ kelkaj el ĉi-tie starigitaj demandoj. Ili povas helpi trakti la renkontitajn defiojn aŭ instigi vin revi pri alispeca socio. Kaj sendube ĝi alportos al vi novajn demandojn.

1.3. Junularo kaj interkultura lernado: defioj

Ĝenerale la vivo de junuloj estas plena je okazaĵoj kaj ili estas malfermaj al ajnaj ŝanĝoj. Junuloj ofte estas ekonomie kaj socie dependaj de aliaj personoj. Krome, ilin facile vundas cirkonstancoj, kiujn ili devas sperti. Estas junuloj, kiuj unuavice samtempe kaj perdas, kaj gajnas, kiam okazas ŝanĝoj. Prenu kiel ekzemplon la kreskantan senlaborecon en Germanio aŭ ekonomiajn miraklojn/katastrofojn en Rusio: junularo kaj profitas kaj suferas samtempe.
Junuloj estas tiuj, kiuj en bluaj ĝinzoj dum rejvfestenoj festas la tutmondan kulturon, estas ili, kiuj la unuaj grimpis sur la Berlinan Muron. Ili studas en eksterlando aŭ elmigras, ili transiras limojn kun validaj pasportoj aŭ kontraŭleĝe en riske etaj boatoj. Sekve, junuloj estas plej malfermaj al procesoj de interkultura lernado, al interkonatiĝo kun novaj homoj, al malkovro kaj esploro de diverseco.

Sed la vivmaniero kaj tre variaj vivkondiĉoj kiujn spertas junuloj ne nepre provizas la taŭgan kadron por la valora, sed malfacila proceso de interkultura lernado. Kiam ni parolas pri interkultura lernado kaj junulara laboro, ni ankaŭ parolas pri tio, kiel junuloj sukcesas trakti siajn kompleksajn kaj variajn fonojn, kaj ĉi-lasta signifas neceson kontraŭstari aferojn, kiuj montriĝas konfliktaj.

Sube ni prezentos kelkajn ĝeneralajn tendencojn bazitajn sur nia sperto pri junulara laboro kaj rezultoj de sociologia kaj junulara esploro. Memoru, ke ili estas nur gvidlinioj kaj ne nepre taŭgas por ĉiu unuopa persono. De unu flanko ili montras diversajn sociajn evoluojn kiujn devas trakti junuloj, kaj de alia flanko montras, kiel tiuj rilatas al (aŭ ofte konfliktas kun) ĉefaj eroj de interkultura lernado (kiel estos ilustrita en venontaj ĉapitroj en parto pri teoriaj kaj edukaj principoj de interkultura lernado).

- Moderna kulturo favoras al akcelita rapideco, intensaj sentoj kaj tujaj rezultoj. La mondo prezentiĝas kiel serio de intensaj eventoj, kiuj neniel interligiĝas inter si. Tiu troiga dozo de emocioj staras en kontrasto al bezono racie analizi la tuton. Interkultura lernado temas pri konstanta kaj malrapida lernoproceso, plena je kontraŭecoj kaj rompoj. Ĝi envolvas ambaŭ racion kaj sentojn, kaj ilian rolon en la vivo.
- Plejparte la edukado, kiun ricevas junuloj, favoras pretajn respondojn kaj provizas pretajn konceptojn kaj simplajn klarigajn modelojn. Amaskomunikiloj kaj reklamiloj laboras pri simpligo de nocioj kaj profundigas stereotipojn kaj antaŭjuĝojn. Interkultura lernado temas pri diverseco kaj malsimileco, pri

pluralismo, kompleksaj nocioj kaj malfermaj demandoj, finfine pri kritika analizo kaj ŝanĝiĝo.

- Kiam junuloj estas traktataj kiel konsumantoj, la plej gravan rolon ludas kontentigo (ĉefe materia) de individuo. Estas promociita tre speciala tipo de libereco:"travivas la plej adaptita**".** Profesia kaj ekonomia malcerteco plifortigas konkurencon. Interkultura lernado temas pri "mi" kaj "vi", pri maniero interrilati kaj solidareco, pri serioza rilato al aliaj homoj.
- En adoleska aĝo, junuloj trovas malmultajn referencajn kadrojn . En tiu periodo vivsperto kaj percepto de realeco ne formas kompletan unu-tuton. Oni sopiras pri harmonio kaj stabileco. Interkultura lernado temas pri tio, kiel trakti formiĝon kaj ŝanĝiĝon de persona identeco, pri kapablo rekoni ŝanĝojn de signifo, pri akcepto de tensioj kaj kontraŭdiroj.
- Socio donas al junuloj nur malmultajn ekzemplojn de diverseco kaj apenaŭ lasas al ili spacon kuraĝigi ĝin, insisti pri persona rajto esti alia aŭ agi alimaniere, kaj anstataŭ ol lerni pri supereco lerni pri egalaj ŝancoj. Interkultura lernado temas pri diverseco, pri malsamaj vivĉirkaŭaĵoj kaj kultura relativismo.
- Junularo sentas sin senhelpa rilate publikan vivon. Estas malfacile identigi politikajn respondecojn kaj personajn ŝancojn partopreni en la kompleksa realeco de nuntempa mondo. Interkultura lernado temas pri demokratio kaj civitaneco. Ĝi subkomprenas reziston kontraŭ premo, eligo kaj iliaj subtenaj mekanismoj.
- Politikaj kaj publikaj diskutoj strebas simpligi faktojn kaj ne serĉas kialojn. Historia memoro, kiun oni transdonas al junularo, estas kurtigita kaj subjektiva. Tiuj faktoroj ne pretigas junulojn al vivo en la kompleksa realeco. Interkultura lernado temas pri memoroj de pasinteco, pri bezono kaj gardi ilin, kaj en aliaj kazoj batali kontraŭ ili survoje al la nova estonto.

Interkultura lernado en Eŭropa kadro ankaŭ signifas profundan analizon de rilatoj inter Oriento kaj Okcidento kaj krome pretecon eki realan dialogon pri nia komuna kaj malsimila historio.

Oni povas diri multe pli pri la temo. La prezentitaj tendencoj povas aspekti kaj sentiĝi malsame en diversaj landoj kaj sociaj ĉirkaŭaĵoj. Ili estas nek kompletaj, nek ekskluzivaj. Sed malgraŭ tio ili invitas nin pripensi pli pri la stato en kiu troviĝas niaj socioj; pri tio, kiumaniere (aparte laŭ la opinio de junuloj) ilin influu interkultura lernado.

Procesoj de interkultura lernado por junuloj devas nepre baziĝi sur realeco de ĉi-lastaj. Sekve, la planita situacio de interkultura lernado devas trakti integrigon de kontraŭdiraj tendencoj. Kaze, ke oni malferme diskutas kontraŭdirojn, ili povas iĝi taŭgaj elirpunktoj por honesta interkultura dialogo.
La nuntempa situacio estas defia kiel por junularo de Eŭropo, tiel ankaŭ por interkultura lernado. Sed ĝuste pro tio bezonatas multe labori por kaj pri ĝi.